

Sonorilo

64-a jaro, n-ro 4

septembro-oktobro 1972

BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



Sonorilo

Oficiala organo de Belga Esperanto-Federacio, St. Bernardsesteenweg 1078,
2710 Hoboken.

Postĉekkonto: 1634.34 de BEF, Oude Donkiaan 83,
B-2100 Deurne.

Prezidanto: D-ro Pol Denoël, Rue Victor Raskin 20, 4000 Liège.

Redakcio: Drakenhoflaan 97, 2100 Deurne.

Ĉefredaktoro: Fernand Roose

Redakcia sekretario: Paul Peeraerts

Krome kunlaboris al tiu ĉi revuo: S-ino Elfriede Ernst
(Bruselo), s-ro Chris Declerck (Antverpeno), s-ro Eddy
Frederickx (Antverpeno).

FONDAĴO M. Jaumotte-Loquet

FONDAĴO por la Disvastigo de la Informado pri ESPERANTO

Kapitalo: 142 005 BF aldonaj pagoj akceptataj pere de la pĉk 2914 29 de
Maertens G., Brugge 3.

Donacoj al la fondaĵo pere de oficiala akto (ekz. per notaria akto) estu
adresitaj al BELGA ESPERANTO-FEDERACIO, asocio leĝa, por la
fondaĵo. Antaŭdankon!

HET WELGEKENDE
MAGAZIJN VOOR MODERNE HERENKLEDING

in't duifken

GROTE KEUS
IN GEREDE KLEDING.

PASTUMEN · SPORTJASSEN · BROEKEN
UNIFORMEN · CABARDINEN · LODENS
STIJLVOL MAATWERK

KOEPOORTSTRAAT 64-66, ANTWERPEN

RABATO POR ESPERANTISTOJ

LA 57-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

EN PORTLAND

(de nia speciala korespondantino en Usono)

Unu el la avantaĝoj de vojaĝi en karavano al internacia kongreso estas, ke ekde la unuaj momentoj oni renkontas la "kongresan atmosferon". Sur la flughaveno "Schiphol" ni estis 110-ope el 19 diversaj landoj. Tuj regis interkompreno kaj amikeco. Ni ne scias ĉu nia verda koro batis forte pro la fakto ke ni troviĝas survoje al mondkongreso aŭ pro la granda "birdo" kiu atendis por transporti nin al la alia flanko de la mondo. La aviadilo estis vere ege komforta kaj la vojaĝo bona. Kvankam la flugo daŭris 10 horojn, ni alvenis pro la tempo-diferenco nur 2 horojn post nia forflugo en Amsterdamo. En Vancouver kie ni surteriĝis, ni restis ĝis la posta mateno. La urbo estis vere bela, pura kaj sanaera kaj ni fakte bedaŭris tiel baldaŭ devi forlasi ĝin por la sephora aŭtobusa veturo al Portland tra la mirinda ŝtato Vaŝingtono. Alveninte ni povis saluti ĉirkaŭ 800 kongresanojn, kvankam enskribiĝis 923 el 40 ŝtatoj.

Unu el la ĉefaj punktoj de la kongreso estis certe la oficiala inaŭguro, malfermita de s-ro Harry W. Holmes, Honora Prezidanto de UEA. Post liaj vortoj, d-ro Sadler, direktoro de la Centra Oficejo de UEA, legis oficialajn leterojn de la alta protektanto Tom McCall, guberniestro de la ŝtato Oregon, kaj de la urbestro de Portland. Salutis la kongreson diversaj reprezentantoj de registaroj, i.a. s-ro P. De Smedt por Belgio. S-ino Elfriede Ernst salutis en la nomo de BEF jenvorte: "Nome de Belga Esperanto-Federacio mi havas la honoron saluti la kongreson kaj transdoni la bondezirojn por fruktodona kaj sukcesplena laboro en la kadro de niaj difinitaj celoj kaj en la spirito de nia majstro d-ro Zamenhof". Krom s-ino Ernst ankoraŭ 33 aliaj landaj asocioj transdonis siajn bondezirojn. Post tio, s-ro Günther Becker, ĝenerala sekretario de UEA, faris la festparoladon.

La saman tagon ankoraŭ okazis protestanta, katolika, kaj budhisma diservoj por la kredantaj kongresanoj. Oni finis la unuan tagon per "Usona vespero" dum kiu estis prezentataj folkloraj dancoj kaj kantoj.

Lundo estis la komenco de la "laborsemajno" en kiu povis esti ĉeestata i.a. kunvenoj de Tutmonda Esperantista Junulara Asocio, Internacio de Militrezistantoj, Universala Medicina Esperanto-Asocio, Internacia Ligo de Esperantistaj Radioamatoroj, Oomoto, Skolta Esperantista Ligo, Espermenso, ktp. ktp.

La vesperoj konsistis kiel kutime el kulturaj aranĝoj kiel Teatra Vespero, Internacia Vespero, Internacia Balo, kaj Oratora Konkurso.

La 5-an de aŭgusto okazis en la salono Zamenhof de la Hilton-hotelo la oficiala fermo de la kongreso sub la prezidanteco de s-ro Harry W. Holmes. Dum tiu ĉi fermo estis laŭtlegata rezolucio rilate la ĉeftemon de la kongreso "Esperanto kaj Turismo". La rezolucio tekstas jene:

"La 57-a Universala Kongreso de Esperanto, kiun partoprenas 923 homoj el

40 landoj sub la ĉefa diskutemo "Monda Turismo kaj Lingva Diverseco", KONSTATAS, ke kvankam la monda turismo ĉiam pli vastiĝas, la lingvaj baroj malhelpas veran konon de vizitataj landoj kaj ties popoloj, kaj bremsas eblan plian evoluon;

ATENTIGAS, ke samtempa kaj komputera tradukmetodoj, eĉ se ili povos esti utilaj en internaciaj konferencoj, certe ne helpas en turismo;

PROPNAS la ĝeneralan adopton de ununura lingvo por turismo kaj vojaĝa sekureco; kaj

INVITAS la registarojn kaj internaciajn turismajn organizojn kunvoki tutmondan konferencon pri lingvaj problemoj en la turismo.

Tiu ĉi rezolucio estis unuanime akceptata de la ĉeestantaro.

La Prezidanto de la Kongreso nun donis la parolvicon al s-ro Guy Matte, reprezentanto de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) kiu informis la kongresanojn pri la TEJO-laboro kaj la diskutoj dum tiu ĉi UK. S-ino Emilija Lapenna raportis pri la Oratora Konkurso kaj disdonis la diplomojn.

Venis kortuŝa momento de la simbola transdono de la Kongresa Flago al la reprezentanto de la venonta Universala Kongreso, la 58-a en Beogrado, Jugoslavio. La prezidanto de la tiea LKK diris ke duono de la preparlaboroj jam estas farita, sed ke restas ankoraŭ malfacila laboro. Li petis ke la geesperantistoj plejble baldaŭ aliĝu por plifaciligi la taskojn de la Loka Kongresa Komitato (*pri aliĝeblecoj vidu aliloke en tiu ĉi numero*), ĉar oni atendas 4000 partoprenantojn.

Post la kantado de la himno, s-ro Holmes fermis la kongreson. Ĝis revido en Beogrado!

LA 27-a IJK DE TEJO EN TORUŬ, POLLANDO

Kutimo estas, ke la Internaciaj Junularaj Kongresoj de TEJO okazas unu semajnon antaŭ la Universala Kongreso de UEA en la sama lando. Tiun ĉi jaron TEJO ne okazigis sian kongreson en Usono sed en Toruŝ, kun antaŭkongreso en Varsovio kaj postkongreso en Gdaŝsk, pro la fakto ke la granda plimulto de TEJO-anoj loĝas en Eŭropo kaj ne povas pagi transatlantikan vojaĝon.

La elekto de Toruŝ estis certe pravigebla ĉar la urbeto estas unu el la plej ĉarmaj en Pollando, situanta ĉe la rivero Vistulo kaj ĉirkaŭita de densaj arbaroj. La fakto ke antaŭ 500 jaroj naskiĝis en Toruŝ la granda astronomo Nikolao Koperniko kaj ke pro tio la tuta urbo vestis sin tre feste, ankoraŭ pliĉarmigis la tuton.

La nombro de partoprenantoj estis, kompare al aliaj jaroj, relative malgranda, nome ĉ. 250. La "kvalito" de la ĉeestantoj, permesu al ni uzi tiun ĉi iom strangan esprimon, estis kontraŭe pli alta ol kutime. Krokodilado apenaŭ ekzistis. Aliflanke en nia propra lando oni povas nur honti ĉar nur du belgaj gejunuloj vizitis la kongreson, malgraŭ la tre malaltaj prezoj. Ni nur esperu ke venontjare al Sarajevo ni povos sendi pli grandan delegacion.

NIA KALENDARO...

En la pli-malpli baldaŭa estonteco diversaj gravaj eventoj okazos kiuj nepre estas vizitindaj. Ni pensas unue pri la Unua Eŭropa Kongreso en Luksemburgo (Pentekoston, 1973.06.09 ĝis 11) kie kongresos nia Belga Esperanto-Federacio kune kun niaj nederlandaj, francaj, germanaj, italaj kaj kompreneble luksemburgaj geamikoj. Ni pensas pri la 58-a Universala Kongreso en Beogrado, Jugoslavio (1973.07.28 ĝis 08.04) kaj por la gejunuloj pri la Internacia Kongreso de TEJO en Sarajevo kaj pri la Internacia Seminario de GEJ en Darmstadt (F.R. Germanujo).

EŬROPA KONGRESO DE ESPERANTO (kaj 55-a Belga Kongreso)

Loko: Luksemburgo

Tempo: Pentekoston 1973 (de sabato la 9-a de jun. ĝis lundo la 11-a)

Kotizoj: antaŭ 1972.12.31 ekde 1973.01.01

Kongresan(in)o 100 BF 150 BF

Junul(in)o

15- ĝis 25-jara 50 BF 75 BF

Edz(in)o de

kongresan(in)o 50 BF 75 BF

Kotizoj pagendaj al la poŝtĉekkonto de BEF n-ro 1634.34.

58-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Loko: Beogrado, Jugoslavio

Tempo: de sabato la 28-a de jul. ĝis sabato la 4-a de aŭg. 1973

Kotizoj: ĝis 1972.12.31 ĝis 1972.03.31 ĝis 1973.06.20

1. Kongresano ne membro indi-vidua de UEA 1260 BF 1386 BF 1512 BF
2. Kongresano membro de UEA kun Jarlibro 1050 BF 1176 BF 1302 BF
3. Kongresano membro-abonanto de UEA 840 BF 966 BF 1092 BF
4. Edz(in)o de kongresano en kategorio 1 882 BF 970 BF 1058 BF
5. Edz(in)o de kongresano en kategorio 2 aŭ 3 735 BF 808 BF 882 BF

Kotizoj povas esti pagataj al la perantino de UEA en Belgio, f-ino Andrée Orsolini, Rue Paul Pastur 6, 6000 Charleroi (pĉk. 2016.40).

Karavano! Kiel jam plurfoje en la pasinteco, s-ro Grégoir Maertens el Bruĝo organizos aŭtobusan karavanon al Beogrado. Li ankaŭ tre volonte peras por la hotelmendado. Detalojn pri tiu ĉi karavano ni povos publikigi nur en la venonta numero de Sonorilo. Enskribiĝi por la kongreso mem kompreneble nun jam estas ebla kaj eĉ rekomendata.

16-A INTERNACIA SEMINARIO DE GEJ

Loko: Darmstadt, F.R. Germanujo

Tempo: de merkredo la 27-a de decembro 1972 ĝis merkredo la 3-a de januaro 1973

Kotizoj:

Junulo malpli ol 20-jara: 90 germanaj markoj

Junulo inter 21 kaj 24-j.: 100 germanaj markoj

Junulo pli ol 25-jara: 110 germanaj markoj

Tiuj kotizoj inkluzivas la plenan programon, ĉiujn manĝojn kaj tranoktadojn. La aliĝintoj krome ricevos ŝtatan subvencion de minimume 20 germanaj markoj.

Por aliĝi bonvolu sendi antaŭpagon de 140 BF al la peranto por Belgio, Paul Peeraerts, Drakenhoflaan 97, 2100 Deurne (pĉk 10115.08) kie ankaŭ pliaj detaloj estas akireblaj.

29-A INTERNACIA JUNULARA KONGRESO DE TEJO

Loko: Sarajevo, Jugoslavio

Tempo: de sabato la 21-a de jul. ĝis vendredo la 27-a de jul. 1973

Kotizoj: Inter 1350 kaj 1800 BF depende de la aĝo, inkluzive la plenan programon, ĉiujn manĝojn kaj tranoktojn. Individuaj membroj de TEJO ĝuos rabaton.

Pliaj detaloj sekvos.

MARKOLAJ NOVAĴOJ

La 10a Markola Kongreso ĉi-jare okazis en la kadro de la impona Internacia Esperanto-Kongreso en Antverpeno. Fakte la amasa partopreno de niaj francaj kaj britaj samideanoj el la markola regiono kontribuis al la vere internacia karaktero de tiu ĉi kongreso. Pro la ampleksa ĝenerala programo ne restis multe da tempo por funde pridiskuti ĉiujn komunajn markolajn interesojn.

Oni elektis la subskribinton kiel reprezentanton por la belgaj kaj nederlandaj markolanoj. Estis ankaŭ decidite ke la 11a Markola Kongreso venontjare okazos en Folkestone.

Bonvolu do jam de nun rezervi la daton: 29a de aprilo ĝis 1a de majo 1973.

Por belgoj kaj nederlandanoj la kotizo estas 100 frankoj ĝis 1973.02.28.

Bonvolu pagi ĝin pere de la Poŝtkonto n-ro 4363.98 de A. Marmenout, Koninginnelaan 98, B-8370 Blankenberge.

Nepre aliĝu por trovi tiun unikan etoson de internacieco kaj ĉarma amikeco kiu ĉiam regas dum markolaj renkontiĝoj!

Albert Marmenout
Markola respondeculo
por Belgio kaj Nederlando

SOMERAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ 1972:

EKSPERIMENTO IĜIS SUKCESO

La Someraj Universitataj Kursoj estis malfermitaj lundon, la 31-an de julio, fare de Ernest Natalis, emerita profesoro de la Universitato de Lieĝo.

Tiuj ĉi kursoj, kiuj daŭris ĝis la 20-a de aŭgusto, estis — laŭ la opinio de P-ro Natalis — aŭdaca eksperimento, ĉar la sola laborlingvo de la kursoj estas la internacia lingvo esperanto. Tiel, do, la kursoj de Lieĝo povus esti la kerno de vere universala universitato, en kiu kune laborus sciencistoj el ĉiuj landoj utiligante la Internacian Lingvon senkonsidere de la propra lingvo.

Natalis, vaste konata pedagogo, memorigis la grandan humaniston Jan Komensky, kiu ripete sugestis ke oni kreu logikan lingvon por florigi ĝeneralan klerecon. Tiun ideon efektivigis L. Zamenhof kreante la Internacian Lingvon. Kiam la profesoroj kaj studentoj praktikas esperanton, ili plenumas la de Komensky emfazatan postulon de empirio, nome ke en certa momento la ago superas la vorton kaj ke oni eksperimentu.

Prof. Natalis, plie, substrekis ke miloj da valoraj verkoj, ekz. sur la kampo de pedagogio, kvazaŭ perdiĝas pro la diverslingveco kaj la manko de sufiĉaj tradukoj.

Fine, la parolanto esprimis la dankon de la Organiza Komitato al ĉiuj subtenantoj de la Someraj Universitataj Kursoj direktante sin speciale al la Universitato de Lieĝo, kiu fare de siaj eminentaj rektoroj Dubuisson kaj Welsch malfermis siajn pordojn al tiuj ĉi kursoj.

La aranĝo (3 semajnoj kun kursoj kaj 1 stud- kaj ekzamensemajno) finiĝis kun tre kontentiga rezulto: partoprenis la diversajn programerojn kaj ĉeestis dum diference longa tempo pli ol 70 personoj el 17 ŝtatoj de Ameriko, Azio kaj Eŭropo. La tre intensajn kursojn kaj praktikajn ekzercojn gvidis jenaj universitataj profesoroj: Wim De Smet (Antverpeno, Belgio), Michel Duc Goninaz (Aix-en-Provence, Francujo), Reinhard Haupenthal (Saarbrücken, F.R. Germanujo), Heinz-Dieter Maas (Saarbrücken, F.R. Germanujo), Tomoo Nakayama (Tokio, Japanujo), Carl Stöp-Bowitz (Oslo, Norvegujo), Istvan Szerdahelyi (Budapeŝto, Hungarujo), Sakutaro Tadokoro (Maebashi, Japanujo), John C. Wells (Londono, Britujo), Richard E. Wood (Baton Rouge, Usono). Krom la lekciaroj el la studdirektoj 'Lingvistiko' kaj 'Medicinaj Sciencoj' kaj la perfektiga Esperanto-kurso okazis pluraj sciencaj kolokvoj en ambaŭ direktoj. Ĉiuj lokaj kaj pluraj tutlandaj gazetoj publikigis artikolojn substrekante la universitatan nivelon de la kursoj kaj menciante i.a. la akceptojn en la Universitato kaj en la provinca kaj la urba administracioj.

La studentoj faris vizitojn al pluraj gravaj institucioj, i.a. al la fama firmao 'Travenol Laboratories'. Diversaj filmvesperoj, vizitoj al la urbo kaj ekskursoj tra la orienta parto de la provinco de Lieĝo kaj ĝis F.R. Germanujo kompletigis la programon.

Pri kelkaj kursoj jam ekzistas stencilitaj tekstoj, aliaj estas preparataj. Tiuj tekstoj, same kiel la SUK-kajero enhavanta rimarkindajn artikolojn pri medicino, lingvistiko kaj la historio de Lieĝo, estas riceveblaj ĉe la adreso de SUK, Boîte Postale 9, 4000 Liège.

recenzo:

Victor Català: "Soleco", el la kataluna tradukis Josep Ventura I Freixas. Romano, broŝurita, 287 p., 1967. Prezo: 19,20 ned. gld.

C.R.A. Declerck

Konjekteble, ordinara Esperantisto povas legi ĉi tiun libron ĝis la fino kun konstanta interesiĝo kaj sen enuo. Kaj verŝajne li ellegos ĝin ankaŭ kun profito sur lingva kampo, ĉar la verko estas nepre vortriĉa kaj plurloke tre poezia. Tamen, de la genieco pri kiu parolas la enkondukanto kaj la tradukinto ni ne trovis multajn spurojn. La altaj literaturaj kvalitoj, kiujn ni prave kaj rajte atendis post la eklego restis promeso kiu ne tute efektiviĝis.

La roluloj de la romano havas ĉion necesan por igi tipojn indaj je mondliteraturo, sed nek ili, nek la verko entute atingas tiun altan nivelon de plenece. Ŝajnas, ke la aŭtorino intencis verki ne romanon, sed serion da fabeloj. Siajn fantaziojn ŝi surfadenigas pere de maljuna vidva paŭstisto, kiu ĉiam kaj ĉie pretas rakontadi. Tiuj fabeloj, envelditaj en la romano, anstataŭ alporti gravajn erojn al ĝi, ĝene kaj sennecese plivastigas ĝin, interrompas ĝian elvolviĝon, stagnigas la agadon. Krome, ĉe kaj tie ne mankas sentimentaleco, naiveco kaj trosimpleco, ne nur flanke de la protagonisto virino, sed niaopinie ankaŭ flanke de la verkistino. La afekciigo de la heroino al suĉŝafido kaj poste al katetoj — por doni ekzemplon — estas iom ridinda; la insisto pri religiaj sentoj, kredoj kaj kutimoj ne ĉiam plivalorigas la verkon; sed vere teda en ĝi estas la ĉie subiranta tono edifa, se ne rekte moralpredika.

En la 'klarigoj' sur p. 7 estas menciitaj tri ĉefroluloj. Ni miras, ke estas ellasita la kvara, la edzo. Laŭ ni, kvankam li tute ne altrudas sin al la atento, tiu viro estas tre grava. Fakte estas li, kiu kaŭzas — kunlabore kun la Spektro — la vivruiniĝon de la virino, ĝuste pro sia malforta karaktero, pro sia cedemo kaj pasiveco. Li estas homo senenergia, indiferenta kaj inerta; pigrulo nekuraĝa kaj poltrona. Pro tio li, Matio, flegma, sentempera viro, estas grava antagonisto. Kontraste al li, lia edzino, Mila, estas aktiva kaj amiva, laborema kaj honesta virino. Ŝi renkontas sinceran amikon en la persono de la paŭstisto, devokonscia kaj saĝa matura viro. En altmontara regiono evoluas la vivo de la kvar ĉefroluloj, du protagonistoj (pozitivaj karakteroj): la virino kaj la paŭstisto, kaj du antagonistoj (negativaj): ŝia edzo kaj iu vaganta, fia fripono, la Spektro. Tiu lasta estas primitiva homo, ruzulo kaj marodisto. Li kuntrenas al la malbono Mation, kiu baldaŭ evidentiĝas monavida; li murdas la paŭstiston kaj priŝtelas lin; fine li perfortas la virinon. Matio neniel reagas kaj tiel indignigas la leganton. La paŭstisto estas respektinda, la Spektro abomena, Mila eble vekas simpatian kaj kompatan, sed nepre estas Matio kiu pleje levas en ni emociojn. Ĉu eble li estas la plej konvinka karaktero en la verko? Ifoje la roluloj ja impresas neaŭtentikaj, precipe Mila. Ŝi estas jen realema, jen naivega; jen nekredema, jen superŝiĉa; jen timema-pudora, jen voluptema; unuflanke iom skeptika (pri la religio), aliflanke neverŝajne impresibla per fabelo porinfana. Por fini, ni ne povas ne diri ion pri la ekstera aspekto de la libro. Ĝi estas bonpapera, grandlitere kaj klare presita, abunde ilustrita per desegnaĵoj, sed — domaĝe — fuŝe broŝurita. Kial? Kun malmola, fortike fiksita kovrilo ĝi estus multe pli valora.

KROME APERIS..

AL TORENTO; novelo (1930) Stellan Engholm (1899 - 1960). 95 p. 20 cm. 75 fr. Tria eldono de originala romaneto de sveda aŭtoro pri 16-jara terlaboristo.

DOLĈA FRANCLANDO, LA (1972) Pierre Delaire. 124 p. Ilus. 22 cm. Bind. 280 fr., broŝ. 210 fr. Kun vigla kaj persona rakonta stilo la aŭtoro gvidas la leganton de regiono al regiono. Multaj fotoj.

FIRST COURSE IN ESPERANTO, A (1972) William Auld. 31 p. 28 cm. Vendata kun ses sonbendoj. Novmetoda rapidkurso de Esperanto por anglalingvanoj.

FUNDAMENTELE FEITEN OVER DE INTERNATIONALE TAAL ESPERANTO (1965) Prof. D-ro Ivo Lapenna. 22 p. 20 cm. Ofseta represo de la unua eldono. Ĝenerala superrigardo de la Internacia Lingvo kaj de ĉiuj terenoj kie ĝi estas uzata. En la nederlanda lingvo. 10 fr.

HILELISMO, PROJEKTO PRI SOLVO DE LA HEBREA DEMANDO (1901) L.L. Zamenhof. El la rusa originalo trad. A. Holzhaus (1972). 86 p. 21 cm. 225 fr. Paralelaj tekstoj rusa kaj esperanta. Zamenhof proponis purigi la hebrean religion kaj krei por hebreoj proprajn lingvon kaj teritorion.

HISTORIA KAJ FILOZOFIA FONDO DE LA MODERNA PACIFISMO. Harold Bing. Esperanta eldono 1971. 28 p. 17 cm. 18 fr. Eld. Internacio de Militrezistantoj.

KVIN FILOZOFIAJ VERKOJ DE PREZIDANTO MAŬ (1972) 287 p. 14 cm. Plaste bindita. 14 fr.

LIRIKO. Lesja Ukrainka (1871 - 1913) Komp. N. Adrianova. El la ukraina tr. K Gusev k.a. 86 p. 21 cm. 26 fr. Poezio tut trapenetrita de ukraina folkloro kaj amo al popolo kaj libero.

RAKONTOJ EL PLURAJ LANDOJ. Fred Parker. 89 p. 21 cm. 35 fr. La aŭtoriginale reverkis en Esperanto rakontoj kolektitajn dum libertempoj en multaj landoj.

SKIZO DE LA HISTORIO DE BULGAL ESPERANTO-MOVADO (1971) Komp. Ivan Sarafov. 58 p. Mimeo. 30 cm. 83 fr. Kun tabelo de kongresoj kaj bibliografio SONGŬO KAJ MALDORMO SUB LA KARPENETO (1972) Ivo Andrić. El la serba tradukis Imbert Roger kaj Tišljar Zlatko. Novelkolekto. 78 p. 17 cm. 100 fr. 13 diversaj noveloj de tiu ĉi Nobel-premiito.

DISE EN LA MONDO

S-ro Pirlot el Oostende faris opinionsondado pri Esperanto en kelkaj lernejoj. La rezultoj sekvas ĉi-sube:

1) ĉu vi jam aŭdis pri E?	jes	: 86	%
	ne	: 14	%
2) ĉu vi iom konas E?	jes	: 2	%
	parte	: 1	%
	iomete	: 9	%
	ne	: 88	%

3) ĉu vi aŭdis pri la someraj universitataj kursoj en Lieĝo?	jes	: 7	%
	ne	: 93	%

4) ĉu vi kontraŭstaras la enkondukon de E en la lernejojn kiel libera fako?	jes	: 22	%
	ne	: 77	%
	?	: 1	%

S-ro Pirlot enketis ĉe 92 personoj.

La unua filmfestivalo en esperantista rondo okazis inter la 23-a kaj 30-a de julio en Vieno, Aŭstrio, okaze de la Eŭropa Esperanto-Konferenco 1972. Aliĝis al la aranĝo partoprenantoj el la jenaj landoj: Aŭstrio, Francujo, Germanujo, Izraelo, Japanujo, Jugoslavio, Meksiko, Nederlando, Norvegujo kaj Svedujo.

En Kalezo, Francujo, oni donis al 6 novaj stratoj la nomojn de 6 elstaraj personoj. Unu el la ses stratoj nomiĝas "Rue Zamenhof".

"Os Lusíadas" de Luis de Camões, ĉefa verko el la portugala literaturo, aperos en Esperanto sub la titolo "La Luzidoj". Eldonos ĝin Johano Régulo Pérez, kun apogo de Institucio Hodler kaj sub aŭspicioj de UEA.

La 29-an de junio, en la Reĝa Ateneo de Eupen okazis premio-disdono sekve al la Esperanto-kurso en tiu ĉi urbo. Entute 37 gelnantoj sekvis la lecionojn en la Reĝa Ateneo kaj en la Ŝtata Lernejo por Geinstruistoj. 19 gelnantoj faris ekzamenojn el kiuj 5 akiris 90 el 100 poentojn aŭ pli. Ili ĉiuj ricevis libro- kaj monpremiojn.

Belgio havas novan Esperanto-grupon. Jam antaŭ pluraj monatoj ekaktivis en Kalmthout (norde de Antverpeno) nova Esperanto-kerno. La grupo nun havas pli ol 20 membrojn kaj petis aliĝon al Belgia Esperanto-Federacio. La tuto estis precipe sekvo de la pasintjara kurso en Kalmthout. Tiun ĉi jaron s-ro Jos Orban denove gvidas kurson por 12 gelnantoj inter kiuj kelkaj lokaj eminentuloj.

EL LA ESPERANTA GAZETARO

KONTAKTO, la oficiala organo de TEJO, iĝas ĉiam pli interesa. La aŭgusta numero temas ĉefe pri la "Tria Mondo", nome pri problemoj en Afriko kaj Azio sub la titolo "Du miliardoj ankoraŭ ne vivas homan vivon". KONTAKTO krome decidis esperantigi ĉiujn proprajn nomojn kiel ekz-e Dickens, Frojd kaj boĵole. Ĉu unu plia tipa TEJO-spritaĵo aŭ plena seriozeco? Abonoj: 8 gld. ĉe UEA.

La julia-aŭgusta numero de ESPERANTO (la 800-a!) temas grandparte pri la eŭropa unuiĝo kaj la rolo de Esperanto en ĝi. Krome oni atentigas pri Dimitrov kaj Tolstoj, du eminentaj figuroj kies apogo grave influis la pozicion de Esperanto. Abonoj: 22,50 gld. ĉe UEA (senpaga por membroj-abonantoj de UEA).

La revuo KONCIZE, antaŭe sendata senpage al la junaj membroj de la belga, franca, germana, itala kaj nederlanda sekcioj de TEJO, nun ankaŭ ricevas la grekaj gejunuloj. KONCIZE ĉiam koncize informas pri ĉiaj esperantistaj aranĝoj en okcidenta Eŭropo. Abono: 40 fr. al la redakcia sekretario de "Sonorilo"; por junulaj membroj de BEF (16- ĝis 25-j.) senpaga.

EL LA NACILINGVA GAZETARO

Dank' al la kunlaboro de pluraj novaj-agentoj, aperis pluraj artikoloj pri Esperanto en la belgaj ĵurnaloj. La novan broŝuron de s-ro Ralph L. Harry, ambasadoro de Aŭstralio en la Federacia Respubliko, "Vortaro por la Olimpikoj" recenzis "De Antwerpse Gids", "La Cité", "La Lanterne", "De Nieuwe Gids", "Het Volk" kaj "La Wallonie". La novan libreton en la serio Marabout Flash "Je parle espéranto" menciis "La Cité" kaj "Gazet Van Antwerpen" mallonge recenzis la novan "Esperanto Gramatiko" de Paul Kempeneers.

La Universitataj Kursoj en Lieĝo precipe en la franclingva gazetaro ricevis multe da atento. Kelkaj simple atentigas pri la fakto sed aliaj kiel "La Meuse", "Le Peuple", "Le Monde du Travail", kaj "La Wallonie" abunde raportis. "La Meuse" eĉ kopiis, je la fino de tre pozitiva artikolo, kelkajn esperantlingvajn frazojn el la "kongreslibro" de la kursoj. Kelkajn tagojn poste la sama gazeto grande titolas: Usona profesoro hazarde

renkontas siajn skotajn gepatrojn sur la "Pont des Arches". Temas pri s-ro J.M. Wood kiu en Lieĝo instruis lingvistikon en Esperanto.

"De Volksgazet" kaj "De Antwerpse Gids" menciis la komencigon de novaj Esperanto-kursoj en Antverpeno kaj atentigas pri la fakto ke la studinto ricevos ŝtate rekonitan diplomon.

Pri la pasinta Universala Kongreso en Portland pluraj ĵurnaloj favore raportis. "Nord Eclair" aldonas al la kutima raporto ke cent mil personoj flue parolas Esperanton, sed ke pluraj milionoj havas elementan konon.

La 8-an de julio la novaj agentejoj AFP teleksis al ĉiuj siaj korespondantoj la jenon: "Romo - La unua edziĝo en Esperanto hodiaŭ okazis en la preĝejo de la s-taj Kosmo kaj Damiano. La jeso de la geedzoj, la prediko de la pastro, la liturgia kaj ĉiuj kantoj estis en Esperanto". Ĉiuj franclingvaj gazetoj publikigis tiun ĉi... falsan sciigon, ĉar verŝajne nur Dio scias la kioma esperanta geedziĝo tiu ĉi jam estas. Ne sen kialo oni nomas Esperanton edz-peranto!

En "La Cité", "Le Courrier", "Le Courier de l'Escout" kaj "Vers l'Avenir" L. Portugaels publikigis grandan artikolon pri la Internacia Lingvo, sufiĉe favora, sed bedaŭrinde kun iom malnoviĝintaj faktoj. Ankaŭ tio ĉi okazis sekve de la universitataj kursoj en Lieĝo.

Ni memorigas al la legantoj ke fotokopioj de ĉiuj menciitaj artikoloj estas akireblaj kontraŭ po unu poŝtmarko de 4,5 fr.

Personoj kiuj interesiĝas pri gravaj artikoloj priesperantaj el la monda gazetaro povas iĝi abonantoj de la "Eltondaja Servo" de UEA. Kontraŭ pago de nur 20 gld. jare ili daŭre ricevos fotokopiojn de ĉiuj gravaj artikoloj.

KORESPONDI DEZIRAS...

Florea Buciu, Mr. Racoteanu 22, Sector 4, București, Rumanujo, dez. kor. pri la E-movado.

32-jara estona instruisto dez. kor.: Ahto Kaljusaar, Pohja 2-3, Viljandi 202900, Estonia SSR, Sovetio.

Jesuo Perez Caballero, Tomas Miller 54, Las Palmas, Kanariaj Insuloj, Hispanujo, dez. kor. kaj interŝanĝi bildkartojn.

IOANNES GOROPIUS BECANUS, MEDICINISTO KAJ FILOLOGIA PIONIRO EN LA RONDO DE CHRIST. PLANTIN.

(Resumo de parolado de Drs. E. Frederickx dum la Internacia Kongreso en Antverpeno)

Estimataj gesinjoroj, La viro pri kiu mi parolos, nuntempe bedaŭrinde ne plu estas la tre mondkonata Antverpenano de sia jarcento kaj de la sekvintaj jarcentoj. Li estis pioniro en la lingvoscienco kiu eble ne ĉiam pravis sed kiu certe meritas pli da famo.

Li nomiĝis nederlande Jan Geertzzone, Jan Gerartsson, Jan Gerartsen van Gorp, Gorop Van der Beken aŭ Becan. Li mem preferis la latinan nomon Ioannes Goropius Becanus.

Li naskiĝis la 23an de junio, je la festo de Sta Johano Baptisto, kaj pro tio li ricevis la nomon Ioannes.

Becanus aŭ Beke aŭ Van der Beken indikas la vilaĝon en kiu li naskiĝis: Hilvarenbeek apud la nuna limo inter Belgio kaj Nederlando, vilaĝo kies originala nomo nur estis Beek, kiel ankoraŭ nun la Hilvarenbekanoj nomas sian vilaĝon.

Goropius aŭ Gorp indikas kvartalon en Hilvarenbeek nomitan Gorp, kvartalon kiun la prapatroj de Becanus fondis. Ĉiuj personoj en Flandrujo aŭ Nederlando kaj eble eksterlande kies nomo estas Van Gorp havas prapatrojn kiuj loĝis en la kvartalo Gorp en Hilvarenbeek. Ili verŝajne estas parencoj de nia humanisto.

Geerstzone aŭ Gerartsen sciigas nin ke la nomo de lia patro estis Gerard, Gerardo.

Estas kelkaj malfacilaĵoj pri liaj naskiĝkaj mortjaroj. Ĉiuj biografoj skribas ke li naskiĝis en 1518 kaj mortis en 1572.

Lia epitafio tamen diras ke li mortis en 1572 kaj ke li vivis dum 53 jaroj. Kelkaj deziris ŝanĝi 53 en 54 por akiri kiel naskiĝjaron 1518. Sed li mem skribis en sia "Hermathena", p. 140 ke li naskiĝis jaŭdon la 23an de junio en 1519. Fakte en 1519 la 23a de junio estis jaŭdo.

Do, oni dirus, ke la epitafio pravas, li naskiĝis en 1519, mortis en 1572, vivis do 53 jarojn. Bedaŭrinde, laŭ mi, ankaŭ la mortojaro 1572 estas duba. Mi fidis por tio al kelkaj leteroj de amikoj de Becanus. Unue mi fidis al du leteroj de la princ-episkopo de Lieĝo, Gerard van Groesbeek al sia vikario Laevinus Torrentius (Lieven Van der Beken), la estonta dua episkopo de Antverpeno. Li

skribis tie ke Becanus salutas lin kaj ke li ricevis leteron de Becanus. Tiuj leteroj estis skribitaj la 24an de januaro kaj la 7an de februaro 1573.

Due al du leteroj de Plantin: unu de aprilo 1573 al Hopperus en kiu Plantin skribis ke Becanus estas vizitonta lin kaj alia al Pighius (Wijnants), bibliotekisto de la kardinalo de Granvelle, en kiu li skribis ke post la morto de Masius, ankoraŭ Becanus mortis. La orientalista Andreas Masius (Maes) mortis la 7an de aprilo 1573.

Ankaŭ la registroj de la Antverpena orfejestraro en la urba arĥivejo indikas la jaron 1573 kiel mortojaron de nia humanisto.

Becanus studis en sia naskiĝvilaĝo Hilvarenbeek en la kanonikarlenejo kaj en 's Hertogenbosch en la liceo de la Fratoj de la Komuna Vivo. Poste li studis en la universitato de Loveno, unue filozofion. Li estis la tria de la promocio "Magister Artium" la 27an de marto 1539. Poste li studadis la tri klasikajn lingvojn en la fama "collegium trilingve" de Busleyden kaj de Erasmus. En 1544 li mem estis profesoro de filozofio kaj en 1545 li komencis la studon pri matematiko kaj medicino.

Post la akiro de la diplomo de kuracisto li vojaĝis tra Italujo, Hispanujo, Germanujo, Anglujo kaj Francujo. Li mem skribas en sia verkaro ke li vidis München, Trier, Ulm, Köln, Paris, Orléans, Poitiers, Lyon, Bordeaux, Pavia, Bologna, Padua, Mantua, Firenze, Roma, Napoli, la Monte Cassino, Salamanca, Guadalupe, Valladolid, la Pironeojn kaj la Alpoj. En Hispanujo li estis privata kuracisto de la du fratinoj de Karolo V-a.

Ankaŭ Filipo II-a de Hispanujo dufoje proponis al li iĝi privata kortega kuracisto. Becanus tamen rifuzis kaj ricevis de Filipo belegan juvelon kaj alian dumvivan renton, pagendan de la urbo Sevilla.

En 1554/1555 li urbanigis en Antverpeno kaj tie li renkontis sian estontan amikegon Kristoforo Plantin, la estontan mondfaman presiston.

(Daŭrigota en la venonta numero)

Por ĉiuj viaj asekuroj - reasekuroj

unu adreso :

J. VERDYCK & Co Pvb.

ANTWERPEN, Lange Nieuwstr. 30

Telef. 03/320902 - Telekso 32283 - Telegr. "Dyckassur"

Oficejoj en London - Rotterdam - Lieĝo.

Reprezentanto ĉe "Lloyd's - London"

Unuaklasa Servo

Faklerta laboro.

Korespondas en Esperanto.

FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN

P. V. B. A.

St.-Bernardse steenweg 631
Hoboken

Vitraloj - Speguloj -
„securit“ vitro
kolorigitaj vitroj
aluminiaj senmastikaj
stangoj por kupoloj

Vitro-cementoj por
tutvitra-konstruaĵoj
mastiko

Telefono 272875